

Mikaelo Bronŝtejn (Rusio)




Al Tatjana Georgievna Loskutova

Ni ne scipovas transsalti
la kelkjardekan abismon,
ni ne kapablas reveni
al nia hela junec',
kaj mankas tempo por halti
l' tempo fuĝas ja tra l' prismon
de la imago, eĉ sen ni
nin mem trompadas sen dec'.

Sed dum la pensoj kapturnaj
nin ĉagrenigas kuraĝe,
dum nian dormon trankvilan
mave mornigas maljun',
niaj konvinkoj maturaj
flustras, ke estus ne saĝe
lasi en int' okulbrilon,
kiu ĉeestas ĝis nun.

Do same batu la kor' en
brustoj de ni, impetante,
restu por vivo motivo,
regu nin la opini',
ke ni l' instruan laboron
faras ne vane konstante,
kaj daŭros plu nia vivo
en la lernantoj de ni.



Koketulinuoj

Koketulino mia blonda,
dolor' de mia vaga junio, -
post daŭra ligo koresponda
nelonge daŭris nia kuno.
Vi brilis en la am'-impeto,
ĝuante signojn de adoro,
do, ankaŭ por strangul'-poeto
loketon trovis en la koro,
kaj, en la kron' de amaj venkoj
forŝvebis por admiro monda
larmeto de junulaj verkoj,
koketulino mia blonda.

Koketulino mia bruna
el miaj flamaj, la tridekaj,
posedantin' de l' fajro suna
en lipoj kaj okuloj pekaj.
Kurtenon movis nokta vento,
amoro fluis en krepusko,
kaj gapis lun' sen ajna pento
al pura bel' de via brusto.
En hela nud' aŭ en susur' de
facila silko, simpl' katuna -
mi sonĝis reaperon nur de
l'koketulino mia bruna.

Koketulino mia rufa,
aŭtuna rikoltaĵ' malfrua, -
la vivdescend' ne estis kruta
kun via amo kontinua.
Tritikmaturon travagantaj,
ni haltis en premataj spikoj,
kaj spektis nuboj forflugantaj
rufharojn sur la ruftritikoj.
Tiam, en kanto de l' pasio

triumfis ĉasta kaj malpruda
la lasta am' – la lasta ĉio,
koketulino mia rufa.

Koketulinaj miaj foraj,
la amatinoj malavaraj,
miksiĝis viaj tri koloroj
en miaj griziĝintaj haroj.
La songoj vagas en nebul' de
tro kurta maja nokt' vizia.
Plu daŭras viv' kvazaŭ senŝulde,
sed ŝuldon sentas koro mia.
Mi ne priploras vian mankon,
Sed scias mi ĉe l' rememoroj,
ke al vi ŝuldas saĝan blankon,
koketulinaj miaj foraj.

Majo 2003

Jen miaj infanoj –
pinetoj, kiujn mi plantis
en la diafanaj
matenoj. Kaj pasis kvin jaroj.
L'odoro kaj ĉarmo,
pri kiuj mi iam kantis,
denove kun varmo
ekfluas en miaj arbaroj.

Ne gravas do, kiom
da jaroj donos l' destino –
ja iom post iom
la pinoj kreskos eĉ sen mi,
kaj do post jardekoj,
eble, mia nepino
l'arbaron revenos
por ĝui kaj novajn semi.

Gurdita temo pri l' folia oro
ne rampu en poemon mian pene.
Sed kial maltrankvilas mia koro,
spektante tion, komprenante ke ne
plu daŭros ben' de tiu ĉi aŭtuno?

Mi tuŝas la foliojn multkolorajn
klininte min, kaj kaptas min kaptuno.

Aŭtunojn intajn, rememorajn – plorajn,
fascine ĝojajn, amoplenajn, tristajn –
retrovas mi en la kolora bunto.

La agojn de la sorto, plej kapricajn,
mi vidas kvazaŭ en realo. Nun do
komprenas mi l' kialon de ripeta
aŭtuna emo per poem' prilumi
la foliaron: ŝatas kor' poeta
eventojn de l' iamo foliumi.

En mia oktobra arbaro,
for de ĉiutagaj kvereloj
flavetas en musko helverda
kantantaj por mi kantareloj.

La kant' de odoro kaj gusto
Ektentas, ĝojigas kaj ravas,
Ne lasas mi ilin en musko,
Por bona frandaĵo forrabas.

Kaj paŝas mi plu kun la kanto,
Donaco de l' fungoj aŭtunaj,
sendube bonŝanca paŝanto
kun revoj, multpli ol mi junaj.

La malnova tombej' kaduka en
Sankt-Peterburgo.

Tomboŝtonoj pace ĝuas funebran aŭtunan
oron.

Flugis for en Leteon kelkaj jarcentoj nur, do
sun' la sama varmon malavare ofertas, por en
tiu lasta varmo oktobra de la kuranta jaro
trovu eĉ la ŝtonoj humile konsolan benon
ĉe la ora katuno kaj kupro de la foliaro,
kiu pompe nobligas la teron kaj la matenon.

Triangule flugantaj grupoj super la krucoj krias,
kaj la krio trista sopiron semas al foro suda,
al la marĉoj afrikaj fremdaj, al ŝvita ĝangalo,
kies
karesema gastamo voka aŭdeblas ja eĉ por
surda.

Mi la polmon lante levas al mia frunt' viziere

por rigardon ĵeti sor al la grua vokanta krio,
dezirante ke, dum mi daŭre restadas surtere,
post sezonaj ŝanĝoj rapidaj por mi ripetiĝu
ĉio.

Yi Qiao (ĉino en Germanio)



Duonjarcenta akompano

Rendevuis ni unuafoje,
kiam vent' printempa jen susuris.
Vi ridetis kiel roz' survoje,
amkonfeson al vi mi murmuris.

Haste lirlis vivotempa fluo,
vizi-song' juneca lante svenas.
Sub vespera sun' kun muta ĝuo,
reciproke koron ni komprenas.

Trovas mi de vi ankoraŭ l' belon,
kvankam sulkoj jam sur vang' aperas.
Rigardante kune l' vastĉielon,
ni dum sunsubir' tenere kveras.

Kvindek jaroj pasis palpebrume,
ni serenas fide krepusklume.

Printempo en la aŭtuno

En aŭtuno ni printempon serĉas,
por belec' frujara de l' naturo.
El memoro la junec' emerĝas,
fora jam la voj' kun svena spuro.

Jen la maro de dumvivo vastas,
horizonte flagras krepuskbrilo.
Kune ni serenaj, ne plu hastas,
vivrivero lirlas en trankvilo.

Al printemp' sopiras la aŭtuno,
la junec' revenas dekomenca.
Post subir' leviĝas nove l' suno,
grace laŭ la ciklo vivosenca.

La aŭtuno kun pasi' fervoras,
kaj printempo ĉe ni ĉiam floras.

Aŭtuna impresio

Briz' aŭtuna tra la kort' susuras,
flavfolioj flirtas kun suspiro.
La ĉiel' ankoraŭ klarlazuras,
penso pri vi plenas de sopiro.

Akvo de laĝeto klar-ondumas,
krizantem' belvervas en ĝardeno.
Jen la sun' aŭtuna milde lumas,
pacigante l' menson kun bel-beno.

Trance mi kontemplas en silento,
spuroj svenas sur paseo fora.
Flustras al vi freŝa l' aŭtunvento,
koro kun aspiro as fervora.

Nun subiras sun' ĉe horizonto,
esperplenos morgaŭ nova l' mondo.

Rita Mkrtĉjan (Armenio)



Vi rakontu al mi, la mateno,
Pri naskiĝo unika de flor',
Pri la lasta kares' de aŭtuno,
Pri la roz' ĉarma, spur' en memor'.

Ne malfermu petalojn, la rozo
La magio de la atendar',
Diafantaj larmetoj de roso,
Repaciga belec' de estad'!

Aŭtuna tag' sopiris koro,
Sencela voj' kondukis min.
Sub piedoj - flava foliaro
La pluv' senfina kaj la voj' sen fin'.

Sed, jen subite - la miraklo
La rozo pala en folia mur',

Ĉu sonĝo aŭ la miraĝo,
Aŭ de sorĉist' fabela tur'?

Sed kiel restis roz' mirinda
survoj', deŝiris ĝin neni',
- Ne nur la dornoj estas en la vivo,
La rozo flustris, kaj nenion pli.

Mi ne povas tro longe atendi,
Ĉielarkon en la firmamento,
Reaperon de sunaj radioj,
Trankviliĝon de pluvo kaj vento.

Mi ne povas tro longe atendi,
Ĝis lumiĝos okuloj de homoj,
Kaj la vivo donacos ridetojn
La felic' enloĝiĝos en domoj.

Mi ne povas atendi tro longe
Ĝis la paco revenos al tero,
La homar' aliĝos en mondo,
Regos amo, espero kaj vero.

Mi ne povas tro longe atendi
Ĝis glaci' de l' animoj degelos,
Sed...se vorto tre varma eksonos
Pri la bono denove mi revos!

Ángel Arquillos (Hispanio)



Min alvokas la ĉielo

Min alvokas la ĉielo,
Ĉar la ter' min adiaŭas,
Kaj malproksime, l' infero,
Kun suspekto min rigardas.

Mi ne pretas por la flugo,
Ĉar flugilojn mi ne havas,
Kaj la varmo de la suno
Tuŝas min per feroj ardaj.

Estas malfacil' l' afero

Ĉi flugado ege stranga,
Per flugiloj ĉe la menso,
Sed kun fido vere klara,

Min alvokas la ĉielo,
Kaj mi kun tristo bedaŭras
Ke mi ne tuŝos la celon,
Ĉar al mi la fortoj mankas.

Nicolino Rossi (Italio)



*dediĉe al mia kara amiko, la Malta poeto
Carmel Mallia okaze de lia naŭdekkvinjara
naskiĝfesto:*

Carmel Mallia, la poeto,
la vivolongo, dokta klero,
la Malta voĉo de l' sincero,
la esperanta vivimpeto!

La longa kurso tra l' vivreto
Vin faris saĝa, luma sfero:
Carmel Mallia, la poeto,
la vivolongo, dokta klero.

Naŭdekkvin jarojn!: salda neto
de verkokrea vivkonkero.
Feliĉu Vi, kanta rivero
de l' poezia interpreto!
Carmel Mallia, la poeto

09-an de novembro 2024

Feri Floro (Hungario)



La vento de aŭtuno

La vent' de aŭtuno forte blovas,
volon al ŝanĝo ĝi nun alportas,
sezono ŝtorma, la folioj tremas,
la tempo por disiĝi tuje alvenas.

Kio ajn vin ĝenas, lasu ĝin for,
kiel sekaj folioj, morta, sen valor'.
Grizas la ĉielo, septembro blovas,
tio, kio vin pezas, la tempo ĝin
solvas.
La veter' aŭtuna forportas ĉion,
kun pluvo kaj vent', ŝanĝiĝas la
vivon,
la agrabla varmo subite malaperas,
kun forta mano la naturo regas.

La vento de aŭtuno krias forte,
ne venas trankvile, nek komforte.
Kio min vundis, mi lasos ĝin for
mi iros kun paco en mia kor'.

Silento

En tiu brua, furioza mondo,
estu la silent', la trankvil', la voĉo.
Kiel flor' sovaĝa sur la kampo,
floru kviete, en certa kanto.

Parolu profunde, kun silento,
via anim' en fekunda eĥo,
vekiĝu ĉiam kun amo en vi,
plena de espero, bona energi'.

Se la silent' diras pli ol la bru',
protektu la vivon, varmecon inspiru.
En la kviet' la anim' resaniĝas,
kun pacienco la pac' riĉiĝas.

La ĉiel' en la nokto malluma
atestanto de pac' la plej pura.
Do, en via silento, brilu sen timo,
via anim' estu, via interna lumo.

La vento flustras tra la montaro,
kanto sen hasto, sen ia tromparo.
Sur la herbej' floroj balanciĝas,
al la mond' aromon disdoniĝas.



Paco

Sur la mond' kie la paco regas,
sian lokon nur la bono posedas.
Brakumoj plenaj de vera konfido,
por la interŝanĝo en trankvilo.

Vortoj sinceraj, veraj kaj tute klaraj,
ne karesas la senton, la amaraj.
Solvaj serenaj, brilantaj tuj vide,
honestaj manpremo, certigas efike.

Aŭdu voĉon de la beno,
kredu je la rozo en la ĝardeno,
sen malamo, ĝi floras en paco,
ni sopiras mondon plenan de graco.

Preferu voĉon de la bono,
ni kredu ĉiutage en la bonvolo.
Sen kolero, ĝui la tagon,
ni sopiras nur pacon, ne batalon.

Koro

Por protekti mian koron,
mi min malgaje retiras,
kovras la spurojn kun rezon',
triste, en malĝoj' foriras.

Sentu vin bone, pensu do!
diras ĉiam mia koro,
nenion malbonon vi faros,
se am' ripozos sen ploro.

Miaj pezegaj memoroj,
nun ne lasas min ripozi,
la temp' pasas, ni silentas,
kaj streĉo komencas boji.

Kaj poste kio okazos?
la tago kion ofertos?
Ĉu restos nur la sufero?
Kia vivo sen raviĝo!

jam dum horoj mi pripensas,

pri ni kaj pri miaj duboj,
resti ĉe vi jes mi volas
ni estas ĝemelaj nuboj.

Revigu min

Mi volas ke vi min revigu,
kiel vi faris en viaj brakoj,
mi petas ke vi min nun veku
kun kares' de viaj manoj.

.
Mi perdis la nostalgion
pro via pacplena rideto,
forgesante pasintecon,
plenigis min la feliĉo.

.
Mi bezonas la saman aeron,
kiun vi enspiris,
kiu forigis mian angoron
kaj ĝojo min plenigis.

.
Vian ĝemon mi volas ĝui
dum vi sentas la karesadon,
vian "koron" tenere tuŝi,
ke vi spertu la amadon.

.
Ekzistas revo pli ŝatata
ol senti sin, sen lim', amata?
kiam vi ekflamigas fajron,
kaj malsekigas la kusenon?

.
Mi bezonas, ke vi min revigu
ke mia sonĝo la vero fariĝu,
ke mi vin havu, karulino,
ĝis venos la eterna fino.

Eugene Khvalkov (Rusio)



Sur la ŝtupoj de sablo, kie ondoj ludas,
la maro rakontas pri feliĉo kaj ridas.
Sub la vasta ĉielo, blua kaj profunda,
la koro rivelas, kie ĝojo abundas.

La aĵoj en la akvo, muskoj kaj konkoj,
kiel sekretoj kaŝitaj, murmuris malhele.
La suno eliras kun dorso kontraŭ l' horizonto,
pentrate ruĝe la fojnan monton.

La vento furiozas, tamen dolĉe ventetas,
kaj ĉiu ondo portas sonĝojn, kiuj petas.
Kiam la vespero alportas siajn suspirojn,
la steloj komencas ludi en la vivoĝojo.

La oceano brua kun potenco viva,
kondukas la pensojn en vojaĝon senfinan.
Ĉiu ondo, kiu frapas, historiaĵon portas,
kaj diros la misterojn, kiuj en ĝi kuŝas.

En la falo de l' nokto, la akvo brilas,
la lunlumo en nebulo la ĉielon vekas.
La koraloj kvazaŭ murmuros en sonĝo,
en la daŭra silento, sub la marospegulo.

Kaj tie, sub akvo, kie koro kaj spirito
fandiĝas kun la ĉielo en danco de amemo.
La maro eksciigas, en sia mistera sino,
ke en ĉiu vivas profundo de l' kaŝita sekreto.

Ĉe la mara bordo ridas la lumo,
la suno ne forgesas, kio alportas magion.
Infanoj ludas kun malgrandaj ŝipoj el ligno,
ĉiu ĝojo lumigas kaj etendiĝas tre foren.

La brizo murmuris kun kantoj de l' ondoj,
kiel se la tempesto jam foriris de l' mondo.
Sur sablo skribitaj, la sonĝoj floras,
en la brakumo de la naturo, ĉio sin prezentas
plene.

Kiam la vespero kolore malheliĝas,
la tajdoj dancas, dum steloj flagras bele.
La maro muĝas per sia profunda voĉo,
Sorĉistino divenas tempeston kaj la ĉielarkan
reĝinon.

En la silento de la nokta magio
sub la stela lumo mi trovas la vojon.
Per flugiloj de sonĝoj pensoj vojaĝas,
en la korfundo dum la tempo sage flugas.

La vento portas min tra memoroj dolĉaj,
kaj miaj pensoj ludas, kvazaŭ en koncertoj.
Ĉiu emocio brilanta en miaj vortoj flosas,
kun la espero de miraklo, l' amo ne foriros.

En la ĝardeno, kie mi parolas kun floroj,
la suno vidas, kaj ŝin ĉiuj admiras.
Aro da koloroj, la ĝojplenaj floroj,
sorĉas la koron, kvazaŭ sub sorĉludoj.

Sub la arbo, kie ombroj ludas,
du animoj renkontiĝas, la mondo kantas.
La tempo haltas en ĉarma momento,
ĉe tagiĝo jam kreskas la sento.

En la sunsubiro, kantos la birdoj,
Sur verda kampo, dancos la floroj.
La vento siblas per dolĉaj melodio,
en la vespero ĝi flustras kaj karesas.

Sub la blua ĉielo lumigita de steloj,
la amo brilas kiel diamanta juvelo.
La magio kantos baladon senfinan,
Kaj la spirito sin perdos sen spuro.

Feliĉo en la koro, kiel la sunradio,
kaj espero brilos kiel stelo en la ĉielo.
Kun l' espero ni kreas estontecon,
Kaj per nia amo ni konstruos novan mondon.

Blazio Vaha (Hungario)



Budimanino

En Zagrebo
vivis bebino...

bubineto...
ĉarma knabino,
junulino bela tre.

Ŝi ekveturis
al Budimpeŝto
al Budapeŝto,
pro ia festo,
por stratbale
beli tre.

Restis ŝi fine
en Budimpeŝto,
en Budim' ŝi
ekloĝis bele,
ekis labori
ŝi en Peŝt'.

El Budimo
la bubino
buse veturis
ofte al Peŝto,
se en Peŝto
estis fest'.

La bubino
en Budimo
fariĝis bela
jam fraŭlino.
Ekplaĉis ŝi
al knab' el Peŝt'.

Ŝi lin fortrenis
kvazaŭ-rabe
geedziĝis
ili Zagrebe,
sed revenis
al Budimpeŝt',

En Budimo
ĉevalaj hufoj
ne plu bruadas,
sed aĉaj budoj
konstruataj

estas nun.

Oni vendas,
oni revendas,
malkonstruas
kaj rekonstruas
budojn en la
palacar'.

Pompa kastelo
pimpaj palacoj
interpalace
tre oftas baloj
rekonstruatas
... bibliotek'.

Eble ĝi restos,
eble ne restos,
iuj ja tie,
tutcerte festos,
ĉar bela lok'
estas Budim'.

Reĝoj tie
brave regadis,
iam ministroj,
nun... nu, gestadas,
gastadas tie
landoĉef'.

Apartamentojn
tutpalacajn
eblas imagi
tute plaĉajn -
fiparoladas
mi sen dec'

Jam la filino
de l' eksbubino
estas bebino,
iĝas bubino,
Budimpeŝta
bela in'.

Ne estas fino,
sed estu fino,
tion proponas
dek du bubinoj,
do tamen estas
jen la fin'.

Jadranka Miric (Serbio)



Malfrua aŭtuno

Sur blua vasta ĉielo
l' aviadilo lasas blankan spuron en hasta
ventpelo.

Li rajdas sur motociklo kun brunulino
dolĉa kiel bombono aŭ sorĉistino.

Suno ankoraŭ orflavas,
tamen la ĉiela koloro ŝanĝiĝas
dum lasta sunradio
droniĝas en malhelo, laŭ volo de Dio.

Eĉ freneza norda ventaĉo kvietiĝis.
Sufiĉe ĝi kaŝe gvatis sub inaj jupoj kaj
laciĝis.

Tamen ĝi sukcesis ridojn ellogi
de inoj estintaj tiel fortaj kaj fi-valoraj.

Al ŝi

Amikino bona,
belvoĉa ofte kantemas
ĝue altsona.
kaj hajkojn skribemas.
Amikino mia, anime pia,— sentas sin
trista

kun peza karmo ŝia
sola longe batalis ŝi
forte kaj verdanime. Asertas mi.

Kara, verdokula ino,
poreterne foriris al panja sino.
Ripozu en paco, kara mia,
akceptu la lastan saluton de

E-amikaro via!

Racio kaj bona emocio

Dolore aŭskultas mi
pri teruraĵo en militaj zonoj.
Ĉiutage homoj estas mortigitaj.
Bedaŭrinde, nin atingas fiaĉaj sonoj.

Suferado kaj krueleco
atingis sian pinton. Ho, Dio!
Ĉu tamen ekzistas pacoobleco?
Inter homoj devas regi bono je ĉio.

Subtenado de tia socinacia doloro,
kune kun politikaj duoblaj standardoj,
ne povas poreterne daŭri.
Tial venku racio kaj en homo ora koro!

Kiam koro parolas

Antaŭ iu domo
sub pluvombrelo staris ni.
En mia mano unu matura pomo.
Unue mordas mi, poste atente vi.

Inter pomomordo okazis kiso,
dolĉe tenera, tre pomodora.
Kun amopetolado mi faris kompromison
por venko de ĉi karma amo aŭrora!

Ora jubileo

La etenditaj manoj viaj
kaŝite kuŝis en la miaj.
Ju pli da varmaj kisoj
des pli da fortaj brakumoj!


Ni inter ĉielo kaj ter'
pro ŝtorma aŭ bona veter',
batalis ni forte en ĉiu momento
kun plena dolĉa amosento.

Tempo kiel vivotento ara
montris ke persistuloj venkas.
La vivo ne trompis nin, kara ci
La jubileon oran baldaŭ festos ni!

Nebulo

Mateno baniĝas
en prujno. Al floret'
apenaŭ kapo leviĝas,
el ĉi tiu frostanta ĝardenet'.
Post nokto malvarma
leviĝas nebul' matena,
Kune kun haladzo venena
vaporiĝas prujno larma.
Sub arbo nuda
en verde farbita domet'
aŭdiĝas birdet'.
Sole malgaja pepado
similas al la paŝbruo sur pado.

Ivanichka Magharova (Bulgario)



Vintra noktmezo.
Soleca vent' postkuras
neĝan lavanton.

Senhejmsunsubir'
rigardas la fenestron.
Trista sole mi.

Glacia maten'.
Frost' sur vitro. Li sola.
Kandelo brulas.

Fromaĝa fasto.
Mi pardonpetas panjon.
Ŝi prisilentas.

Jam mateniĝas.
Kupra kabal' eniras
mian ĉambreton.

En la kameno
fajreroj estingiĝas.
Amara estas vin'.

Senhejma luno
aperis super l' arbar'.
Birdoj raviĝas.

Erika Godó (Hungario)



Nokta silento

Nokta silento, vualo,
fine mondo estas en kvieto.
Steloj brilas hele,
sonĝoj flosas en aero.
Sekretoj kuŝas nokte,
luno dancas sur arboj.
Freŝa vent' blovas ekster,
rakontas historion.

Ĉiu ombro mistera,
forvelkas en nebulo.
Malkovru regnon de sonĝoj,
ili ligas homojn kiel steloj.
Pordego de sonĝoj malfermiĝas,
alia mondo, animo flugas.
Sono de silento ludas,
pacaj momentoj, magio.

La voĉo de la koro

La voĉo de la koro rakontas silente,
ĝi kaŝas sekretojn kiel la noktaj steloj.
Danco de emocioj, mola kaj profunda,
ĉiu korbato estas nova espero.
Amo spicas la tagon,
la ombro de doloro foje restas.
Sed la koro, se ĝi vere volas,
ĝi trovas solvon eĉ sur vojo malfacila.
Do aŭskultu, kion ĝi diras al vi,
ĉar la voĉo de la koro ĉiam gvidas.
Velura tuŝo, klara lumo,
la plej bela melodio, ĝi neniam finiĝas.

Sidu ĉi tie apud mi...

Sidu ĉi tie apud mi,
ni kune rigardu stelojn.

Trovu nun nian lokon,
en la lumo de ĉiel'.
En la kvieto nokto,
kunbatas niaj koroj.

Sidu ĉi tie apud mi,
rakontu pri viaj revoj.
Pri viaj deziroj,
kaj la celo de vivo.
Via voĉo, milda muziko,
estas kara al mi ĉiam.

Sidu ĉi tie apud mi,
ni sentu la silenton.
Malproksime de bruoj,
nur ni du sur la tero.
La magio de momente,
estas kiel sonĝo, eterne.

Wélington Rocha (Brazilo)



La pordo

Mi tutfaritas el ligno,
ligno, materi' senviva,
sed ne estas en la mondo
ol mi io pli aktiva.

Mi kun zorgo min apertas
ĉar etul' en pas' mallertas.
Ĉar enamiĝint' prestiĝas
al li mi plenmalfermiĝas.

Por la doma kuiristo
mi malfermas sen rezisto.
Por kapitana eniro
mi malfermas sen eĉ spiro.

Mi fermiĝas al diranto
"Tiu stultas, nu en ordo,
kiu povas ne azeni
kun tia cerbo de pordo!?"

Pord' estas mi kaj unika:
fermas l' antaŭon de l' domo
kaj de l' stabej', sen ŝancel':
ferma ĉi mondon mi tenu...
(Ne sin fermu nur ĉiel'!)

Saulo Salgado Wanderley (Brazilo)




Verda lenso

okaze de la naskiĝtago de Roy McCoy

Mi vidas la Mondon tra Verda Lenso:
verdaĵo la tuton pliboniganta,
koloro plenplena de bona senco
al la tuta Mondo la bon'faranta.
Revu, sonĝu, karaj esperantistoj
pri la verdiĝo de malamikeco,
per sin farigi ververaj kantistoj
de l'Alta Lumego de Bonkoreco!
- La Pacon Verdan estigu surmonde,
pri l'kompreniĝo parolu vibrante!
Vi bone kaj tute konas l'aferon!
- Komencu en vi la Verdan Projekton
tiel movante la verdan subjekton!
Altigu la tuton, verdmanieron!

Candeia

Sarah Bambona (Kongo)



Paco kaj amo

Parolu al mi pri paco,
al la rakonto de amo en fabeloj
de libero kaj trankvilo
Diru al mi pri paco,
al la lingvo de amo en paroladoj
de realo kaj sincero
Diru al mi pri paco,
pri amo en la ekspluatadoj
de sociebleco kaj sekureco
Instruu al mi pacon,
ĉe la termino de la amo kun la signifo

de solidareco kaj moraleco
Instruu al mi pacon,
al la movado de la amo en la atmosferoj
de malavaro kaj sekuro
Desegnu al mi pacon,
al la temo de la amo sur paperoj
de honesto kaj diverseco
Kantu al mi pacon,
al la ritmo de la amo sur la notoj
de frateco kaj unueco
Dancu al mi pacon,
al la kadenco de amo sur la ŝtupoj
de famo kaj fiero
Prediku al mi pacon,
al la evangelio de amo pri alvokiĝoj
de vero kaj karitato
Sentigu al mi pacon,
al la tuŝo de amo sur la haŭto
de kareso kaj tenero.
Konstrui mondon sen milito

Ma Wei



Rigardo

mi ofte venas ĉi tien kaj rigardas ĉi tiun
arbron
tra branĉoj mi povas rigardi la ĉielon kaj
la lunon
jen nuboj tra branĉofendoj estas malklare
videblaj
jen folio estas ombritaj de alia folio
jen surbranĉa birdo forskuis siajn plumojn
jen polvoj saltas en la bruo volvita de la
vento
en griza kaj soleca vintra tago
miaj rigardoj ekbruligis la arbron
mi vidas, ke ĝi ekbrilas, senmorta kaj
neestingebla
ŝajne la ĉielo estas ĝia tero
kaj la tero estas ĝia ĉielo
ĝi lasu min regi sian prosperon kaj

velkiĝon
jen la sveltaj branĉoj etendiĝas al mi
jen la sekaj kaj maldikaj folioj flirtas al mi

Wu Junlin

Unudirekta bileto

Amiko, kial vi malĝojas?
Jen la sunbrilo brilas
frue sur la korpon.
Antaŭa vojo estas sunplena
La densa nebulo jam tute
disiĝis kaj svenis
Sed vi ĉiam klinas vian kapon,
rigardas malsupren en l' aero
konfuzitecon. Mi scias, kion vi pensas, vi
diras
ke vi faru ion sensacian
Tio ne estus neeble, sed vi
devos forlasi gepatrojn, familion, kaj
viajn malnovajn amikojn.
Vi diras, ke la vivo rapidas,
vi ankaŭ scias,
ne tro pensu multe
Sed tiu distanco
pli kaj pli malproksimiĝas. En malfrua nokto
la vanteco
sin afflitas
La vivo estas
unudirekta bileto. Nur
amu tion, kion vi nun havas
ĝi ĉiam kuros
antaŭen

Yu Xiuhua

Mi amas vin

mi vivas avide, prenas akvon, medikamenton,
kaj preperas manĝon ĉiutage
kiam la suno brilas, metu vin en ĝin, kiel meti
pecon da mandarina ŝelo
rotacie trinku teojn: krizantemo, jasmeno, rozo,
citrono

ĉi tiuj belaj aferoj ŝajnas konduki min sur la
vojon al printempo
do mi premas la neĝon en mia koro foje kaj
refoje
ili estas tro blankaj kaj tro proksimiĝas al
printempo

mi legas viajn poemojn en pura korto
la amo en la mondo estus kiel pasero, kiu tuj
preterflugis
kaj nun estas hela tempo, do korŝiro ne
konvenas al mi
se mi sendus al vi libron, certe ĝi ne estus
poemaro
mi donos al vi libron pri plantoj, pri kultivaĵoj
ĝi diros al vi diferencon inter rizo kaj lolo

ĝi diros al vi ion pri printempo de lolo
en konstanta timo

Elĉinigi



Ardo (Ĉinio)

Charles Bukowski (1920-1994)



Nirvano

La bonŝanco tute solviĝi de la celo, ne estis
granda.
Li estis juna viro vojaĝanta ien en buso, en
Nord-Karolino.
Komenciĝis neĝi.

La buso haltis ĉe malgranda kafejo en la
montetoj kaj la pasaĝeroj eniris.
Li sidis ĉe la bufedo kun la aliaj, kaj li mendis
ion, la mendita alvenis.
La manĝo estis aparte bongusta,
ankaŭ la kafo.

La kelnerino estis alia ol la inoj, kiujn li konis.
Ŝi ne estis kaprica, kaj ŝi havis agrablan

humuron, kiu radiis el ŝi.
Kaj la fritisto diris frenezajojn.
Kaj la telerpurigisto en la fono ridis
kamaradece rekte kaj agrable.

La juna viro observis la neĝon tra la fenestro.
Kaj li volis restadi ĉiam en la kafejo.
Kurioza sento disvastiĝis en li, ke ĉio tie estas
agrable.
Kaj, ke ĉiam estos tiel agrable tie.

Tiam la busveturigisto diris al la pasaĝeroj, ke
estas tempo ekiri en la buson.
Kaj la juna viro pensis: „Mi simple restos ĉi
tie, mi simple restos ĉi tie.“
Kaj tiam li leviĝis kaj sekvis post la aliaj en la
buson.
Li trovis sian sidlokon kaj rigardis tra la
fenestro al la kafejo.
Poste la buso formoviĝis, ĉirkaŭ vojkurbiĝon,
malsupren, eksteren de la videblaj montetoj.

La juna viro rigardis rekte antaŭen.
Li aŭdis, kiel la aliaj pasaĝeroj parolis pri aliaj
aferoj;
aŭ ili legis ion aŭ provis dormi.
Sed ili ne rimarkis la magion.
La juna viro apogis sian kapon flanken,
fermis siajn okulojn kaj ŝajnis sin dormanta.

Ne estis io alia por fari,
nur aŭdi la zumeton de la motoro,
kaj la sonadon de la pneŭoj sur la neĝo.



Hans-Georg Kaiser

(Germanio)

tradukis laŭ la originalo "Nirvana"

El ĉina antikva poezio

Nalan Xingde (1655-1685)

—laŭ melodio *Papilio super floroj*

Denove mi reiras al la loko
kie mi vidis jen amikojn for
per derompitaj salikbranĉoj.
Rajdante, mi kun ĉagrenita kor',
mi trojis kun viĝo en la mano,
senvorte, en aŭtuna la lumglor'.
Velkintaj herboj min deprimas,
sovaĝanseroj jen forflugas kun gak-ror'.

Vagad' peniga estas nulo al mi,
mi nur malamas l' okcidentan venton,
kiu forblovas de mi belajn revojn
de l' isa kaj la osa tempo en lamenton.
Mi daŭros vojaĝadi morgaŭ,
sen timi dumvojiran la turmenton.
Kun tramalsekigita vest' en pluvo
mi des pli havas tristan senton.

—laŭ melodio *Rememoro pri principo*

Tra la nokto l' okcidenta vento
deŝiris la foliojn de la bananujo kun kruelo.
Dormema okulpar' eltenas jam solecon
dum daŭras longe la aŭtun-vetero.
Drinkante mi devigas min mem
poemon Li Sao jen kun retenita ĉagren-ŝvelo,
kiu tagnokte fluas ja senĉese
simile al Xiangjiang-rivero.

—laŭ melodio *Papilio super floroj*

La plej kompatinda estas
ja la lun' sur la ĉielo.
Ĝi prezentas formon de jad-rondo
nure unu tagon en arĝenta helo,
sed ĝi ĉiunokte senescepte estas
nekompleta jada ringo en apero.
Se mi povus teni min pure brila
kiel lun' dum mia tuta vivo kun espero,
mi volontus ja formeti mian glaci-fridon,
por ke mia korpo vin varmigi kun
prefero.

Tamen tre facilas, ke vi min forlasis.
La hirundoj agas same en vivmaniero:
ili flugas al la kulvualaj hokoj,
kroĉe staras tie por intima kvero.
En aŭtunaj tagoj mi starante
antaŭ via tomb' laŭtkantas al ĉielo,
mia splen' ankoraŭ neniigas.
Kiel mi ja volus kun sincero
kune kun vi flugi kiel papilioj
inter floroj en la primavero!

Elĉinigiŝis



Vejdo (Ĉinio)

Ĉineske

Yi Qiao (ĉino en Germanio)

Impreso en aŭtuno

— laŭ ĉinesko *Mallongigita melodio magnolia**

I.

Briz' susuras,
aŭtun-ĉiel' lazuras.
Plene d' aspir',
foliŝvebas kun suspir'.

Lag' ondumas,
l' aŭtuna sun' mild-lumas.
En la ĝarden'
floras krizantem' kun ben'.

II.

Kun freŝ-sento
susuras l' aŭtunvento.
Jen krepuskbril'
bunte flagras en trankvil'.

Plena l' luno
sekve de l' subir-suno.
Nova komenc'
ciklas kun homviva senc'.

Aŭtuna pejzaĝo

— laŭ ĉinesko *Rivero plenruĝa***

Aŭtunvento
mildŝvebas
tra la ĝarden'.
Plenfloras
krizantemo
por nia ben'.
Ĉielo purlazuras,
jen pasejo al l' eden'.
Meditas
mi pri vivfato
en seren'.

Aŭroras
frumatn'.
Mi gapas
en promen'.
L' acerbosko as
l' alloga scen'.
Ni trinku osmant-vinon
ĉe interpaca festn'.
Amikoj
re-renkontiĝos

sen ĉagren'.

Jadranka Miric (Serbio)

Nasko de plibona Mondo

— laŭ ĉinesko *Sopir-al-sudo****

Noktiĝis
frue. Ĉesiĝis
birdobruo en branĉar'.
La strato kvietiĝis
sed ĝi heliĝis

pro forta
kaj alta lumigilar'
kiuj tre similas al
ora ĉiela stelar'
kaj al lampirar'.

Kaj kie
malaperis ĉi
surtera lampiraro?
Pro klimato ŝanĝo fi!
Tiel kredas mi.

Ŝajnas ke
ĉi mondo havos
ŝancon. Plibonigadon
jam ekis. Tempo daŭros
longe sed venos.

Espero
kreskanta ĉe ni
naskas grandan nombron de
pacdefendantoj. Iri
antaŭen. Venki!

**Mallongigita melodio magnolia (ĉine: jianzi mulanhua): ĉina fiksforna poemo el du strofoj kun po 4 versoj de 4,7; 4,7 silaboj kun para rimo.*

***Rivero plenruĝa (ĉine: manjianghong): ĉina fiksforna poemo el du strofoj kun po 11 versoj de 434,344,77,353 / 33,33,54,77,353 silaboj respektive, laŭ rimaranĝo xxa,xxa,xa,xxa / xa,xa,xa,xxa (x = senrima)*

****Sopir-al-sudo (ĉine: yijiangnan): ĉina fiksforna poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).*

— ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ —
Eldonas Redakcio de *Penseo*

Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Veĵdo)

Retadreso: vejdo@163.com

<http://www.esplerno.cn/penseo/penlisto.htm>

— ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ —